

Karaj geamikoj!

Al mi ŝajnas esti tre aktuala memoriĝi al kursgvidantoj kaj klubestroj, ke aŭskultado de eksterlandaj E-disaŭdigoj de diversaj Radioj povus esti tre utila ne nur rilate al la plej freŝdataj novaĵoj el la tuta mondo, sed surbendigitaj ili povus esti tre utilaj ankaŭ por ĉiu progresanta esperantisto (kaj ne nur) flanke de la bonega internacia prononco kaj stilo. Krome la surbendigitaj disaŭdigoj povas pliriĉigi la kluban laboron per plej diversaj prelegoj farataj de fakuloj.

Ekzemple mi mem regule aŭskultas la Vienan Radion kaj surbendigas ĉiun disaŭdigon, prezentante poste en nia E-klubo la plej freŝajn E-infermojn. Kaj mi konstatis, ke la Viena Radio estas bone aŭdebla ne nur en la Kaŭkaza regiono (Soĉi, Suŝumi), sed ankaŭ en Taganrog kaj en la Ivanova distrikte. De fakte la tuta Eŭropa parto de nia lando (kaj mi kredas, ke ne nur ĝi) povas bone aŭdi la Vienan Radion. Persone mi kaptadis ĝin en la supremenciitaj urboj eĉ per transistara radioricevilo. Per tiuj, kiuj tamen ne kapablos "kapti" la E-staciojn, mi pretas kopii de tempo al tempo miajn surbendigojn plej freŝajn. La longdaŭro de mia senbende estas unu hore kaj duonon, la rapidecoj: 9,5; 4,7; 2,4 m/min - laŭdezire. Ankaŭ la longo de bende povas esti libervola, ĉar unu disaŭdigo de la Viena Radio daŭras 10 minutojn.

La Viena Radio estas aŭdebla sur ondoj: 48m, 16m - sabate; 82m, 48m, 41m, 13m - dimanĉe je la 19⁴⁵-19⁵⁵ (Moskva Tempo).

Jen la plej lastaj informoj.

"Ni urĝe rekomendas la belegajn glumarkojn kun Esperanta surskribo, kiujn ĵus eldonis la Johannes-gimnazio en Lanstein (FRG). Ilin aĉetante oni kunhelpas kaj propagandas samtempe la Internacian Lingvon. Postulu de mi specimenon.

Ni atentigas pri la literaturaj konkursoj "Petrolo" en Navara kaj "Larius" en Como (legu: kome), ambaŭ en Italio. Petu skriban informon de ni.

Ekaperis Internacia Rondo "Amikoj de la Esperanta Literaturo kaj Kulturo". Ĝi estas estrata de Ludwiga Pickel, Poŝtkesto 2113, D 85 Nürnberg 1, Okcidenta Germanio. Aligintoj sin devontigas aĉeti almenaŭ po unu libro en kvaronjaro laŭ la alsenditaj al ili listoj, kaj ĝuas prezredukton de 5%."

El letero de la Viena Radio al V. Besspalov:

"...En Vieno okazas libervola instruado de E-to en sep lernejoj, ekzistas kursoj al instruistoj kaj naŭ grupoj, kiuj kune festas la du Zamenhoffestojn, faras diversajn kunvenojn, prelegojn, ekspoziciojn. Kelkajn aranĝojn ni faras en kunlaboro kun aŭstraj-eksterlandaj societoj, ĉefe kun la pola kaj ankaŭ kun la bulgara, dana, novzelandaj kaj tiel ankaŭ propagandas Esperanton en ĝis nun novaj medioj. Nur kun la aŭstra-seveta societo ni ne havas kontakton, ĉar ili ne dediĉas sin al Esperanto. Ili faras multon, ekzemple aranĝas vojaĝojn, ekspoziciojn, prelegojn, diskutojn, ruslingvajn kursojn, disponigas bibliotekon, montras filmojn. Eble devus veni de via lando la instigo: Se vi kelkfoje sendus kulturfilmen kun Esperanta teksto aŭ surskribo, tiuj filmoj povus migri de unu lando al la alia kaj certe estus bonvenaj ĉie en la movado. Mi opinias, ke Soĉi estas belega urbo inter

la Nigra Maro kaj la montaro kaj disponigas krome pri la valoraj kulturaj vidindaĵoj. Faru mem tian filmon.

Cetere, Radio Moskva havas tre fortan voĉon, kiu ĉe ni bonege aŭdeblas, sed bedaŭrinde ankoraŭ ne en nia sopirata kaj komprenata internacia lingvo.

Fine ni volas atentigi, ke ni sendas sondiskon en E-to al ĉiu, skribanto, de kiu nia stacio ricevis la kvaran leteron aŭ karton.

Samideane ĝis reaŭdo

viaj Grete Braunlich kaj d-ro Karl Beckmann.

Adreso: Esperanto-Redakcio de ORF P.O. Box 700

A-1041-VIENNO Aŭstrio."

Mi deziras al ĉiuj bonan aŭdeblecon. Kaj ne forgesu skribi al E-stacioj pri viaj impresoj kaj deziroj se ne leteron, almenaŭ poŝtkarton, ĉar tion oni bezonas por montri la neceson de sia laboro.

V. Bepalov (Soĉi)

KIA DEVAS ESTI LERNOLIBRO DE ESPERANTO
(El letero al A.B.)

"... vi tuŝis tre gravan problemon: ni bezonas perfektan lernilon. El 6 menciitaj libroj per elementa kurso vi forgesis mencii la lernolibron de leningrada sciencisto Z.V.Semenova "Fundamenta kurso de Esperanto", aperigita 1928 stencile en kvanto 100 ekz., havanta 25 lecionojn, verkitajn zorgeme kaj laŭ nuntempaj postuloj de metodiko.

Postuloj. Ili estas tiel severaj, rigoraj, preskaŭ neplenumebaj, ke ni povas diri simple nur pri 3 ĉefaj: 1)facileco (pri kiu skribas Prof. Th. Cart), 2)koncentra distribuo de leksiko (grafike: kiel spiralo, leviganta supren), 3)lernilo devas kongrui al interesoj de la principo nova homo stereotipe - homo de scienc-teknika revolucio.

Vere, ni esploru demografie nian anaron. Kiu venas al Esperanto? Precipe inĝenieroj, kuracistoj, teknikistoj, matematikistoj, studentoj de politekniko k.a., al kiuj plaĉas "La konstrua perfekteco de Esperanto", kiel oni kutime diras. Sed per profesie kontentigi ilin niaj lernolibroj nenion donas. Kaj ŝajnas, ke postuli tion de la elementaj lerniloj ni ne povas.

Ni ne frapu en malfermitajn perdojn: D-ro István Szerdahelyi jam kreis metodike perfektegan "Esperanto 1" (internacia lernolibro por la lerneja junularo), 1972.

Ni, sovetiaj E-istoj, eble devus krei per komunaj fortoj lernilon per tiuj, kiuj post 3-4 monatoj eksentis la guston de Esperanto, sed ne ankoraŭ ekposedis la lingvon bone. Jes, Vi pravas, A;B., ke necesas kompili Krestomation kun stile modelaj tekstoj. Tion bonege komprenis jam dum Renesanco en Esperanto en nia lando s-anoj I.Ivn kaj N.S.Steinberg, kiuj ambaŭ estis inĝenieroj kaj antaŭvidis-aŭguris tiam (en 1932) rolon de E en la scienc-teknika progreso. Ili eldonis en Harkovo lernilon-krestomatieton, en kiu dominis tekstetoj pri aviakonstruado, scienca fikcio, matematiko, pri fiziko kaj astronomio, vojaĝoj kaj okeanografie... Kaj mi estas firme konvinkita, ke aŭtero de nuna E-lernilo devas esti inĝeniero!

Antaŭ 30 jaroj nia ambasadorejo, kie mi laboris, ricevis el Leipzigo tri poligrafie perfekte faritajn lernolibrojn por studi la rusan, germanan kaj la anglan lingvojn. Ili estis faritaj laŭ la devizo: "Gramatiko estas sklavo de leksiko", kiun mi jam delonge opinias kiel plej ĝusta en komparo kun tiu principo, sur kiu baziĝas nunaj niaj lerniloj. La metodon de material-organizo mi opinias ĝis nun la plej perfekta, mi nomus ĝin milite "principo de totala mobilizado". Certe, la principo de Via ŝatata mnemoniko estis ankaŭ konsiderita en tiuj Leipzigaĵaj lernolibroj. Jen kiel estis konstruitaj tiuj lernolibroj-krestomatiaj:

1. Bildo

- | | |
|--|---|
| 1. Bildo | 9. Anekdoto (1-3) |
| 2. Subteksto al la bildo
(25-30 linioj) | 10. Interesaĵo pri temo (Ĉu vi
scias, ke ...) |
| 3. Demandoj (preskaŭ al ĉiu
propozicio) | 11. Maksimo, frazeologismo |
| 4. Glosej por la plej malfacilaj
vortoj | 12. Sercaj demandoj |
| 5. Dialogo | 13. Lingvoludo, ŝarado, rebuso,
anagramo, krucenigmo ktp. |
| 6. Proverbo | 14. Diversspecaj gram/leks.
taskoj |
| 7. Enigmo (aŭ matematike tasko) | 15. Versaĵeto |
| 8. Kanteto (kun muziknotoj) | 16. "Vagante" temo el paragrafo
al paragrafo (ekz. pri koma
vojaĝo) |

Mi ripetas, ke krei similan lernilon povus nur iu kolektivojde aŭtoroj.

Psikologiistoj diras, ke homoj dum la tago uzas, pensas, praktikas 20-25 temojn. Oni ne mencias ilin, ĉar la homoj havas diversajn interesojn, kiuj dependas de la sekso, aĝo... Ni provu diveni, pri kio pensas la homo. Jen estas proksimume: tempo, manĝo, laboro (aŭ lernejo, instituto), amikoj, familio, libroj, gazetaro, sporto, radio, kino-televido, kalendaro, nature, vetero, vesto, trafiko, poŝt-oficejo, korespondado, Esperanto, E-tendaro, etiketo, urbo, vendejo, loĝejo.

Se ni distribuus temojn kaj donus tempelimojn, unu jaron, ni povus ion verki, ĉu? Certe, la nuntempa metodiko rekomendas ĉiupaŝe konsili-instrui: kielmaniere ekposedi la materialon, fiksadi en memoro, aktivigi ĝin ktp.

Mi esperas, ke "Aktuale" povus organizi disputon pri la menciita problemo.

A. Rogov (Ĥmelnickij)

La Redakcio subtenas la proponon de k-do Rogov kaj atendas viajn opiniojn. De mergu la plumon kaj ...

* * * * * * * * *

En la januara numero de "Aktuale" ĉi-jara estas publikigita artikolo "Grave: terminologia laboro!", kiun sekvis unu suplemento (N^o1). La ceteraj menciitaj en la artikolo suplementoj estas proponataj ĉi-sube (Red.).

Suplemento N^o2

Unueca sistemo por registrado de fakterminoj

1. La sistemo estas prilaborata surbaze de la verkoj /1/, /2/ kaj /3/, menciitaj en la suplemento N^o4.
2. La celo de fakterministo estas koncize determini la meĥanisman (noción) kaj ĝiajn karakterizajn indicojn kaj, se eblas, koncernajn desegnaĵojn.
3. Iru de la ĝenerale al detale. Kun la ĝenerala difino de termino donu dividon de la nocio laŭ specoj, subspecoj, klasoj, grupoj, detaloj, formantaj koncernan meĥanisman. (Tiu-ĉi klasifikado krom pure terminologia senco efektive helpas al studado de koncernaj objektoj, plifaciligas la ĝeneralan skizon de ĝia enhavo kaj formantaj elementoj).
4. Ĉe elekto inter proponata termino en Esperanto kaj la nacilingva (akceptita en la lingvo, kies reprezentantoj unusfoje kreis koncernan noción), preferu uzi la nacian terminon, konsiderante ĝin en simplecon, precizecon, disvastigon en aliaj naciaj lingvoj.
5. Skribu la terminon sur du, tri ktp. slipojn (vd. la ekzemplon) kun indiko de la fonto laŭ la suplemento N^o3. La proponata dimensio

estas 90x130 mm. Poste ordigu la slipojn teksikografie kaj vi ricevos du sliparojn: Esperanta-rusan kaj rusa-Esperantan.

KOMPRESORO /6/
=kunpremo de
la aere

КОМПРЕССОР

КОМПРЕССОР
kompresoro /6/

aŭ

REFRAKTARA /14/
огнеупорный
тугоплавкий

ОГНЕУПОРНЫЙ
refraktara /14/

ТУГОПЛАВКИЙ
refraktara /14/

6. Skribu la proponatan aŭ netradukeblan terminon sur la dorso flankon de la slipo kune kun la frazo el tradukata teksto, indikante la fonton (revuo, dulingvaj vortarojn, librojn ktp.).

7. Sendu la proponatajn terminojn al la TS-estro por ilia redakto kaj livero al TS de ISAE kaj la kompilitan sliparon al la estro de la ST-fako de SEJM por redakto kaj eventuala eldono.

Suplemento №3

Listo de fakterminaroj kaj fakliteraturo

1. Siklaki Istvan kaj Ruisz Rezső. A, vállalatirányítási számítógépalkalmazásfoglalmainak több nyelvű szótára. (Komputil-tekника vortaro hungara-germana-angla-rusa-Esperanta). Budapest. Szám-tástechnikai Oktató Központ. 1972. 462 paĝoj.

(Temas pri kvinlingva fakvortaro pli apliko de komputeroj).

2. F. Munnikma kaj aliaj. Internacia komerca-ekonomia vortaro en 9 lingvoj. Deventer (Nederlando). Eldonejo: Kluwer. 1974. 535p.

/Sub aŭspicio de la Instituto por Esperanto. Bindita. Pli ol 2500 klarigaj artikoloj, vaste uzeblej ankaŭ por neesperantistoj. Grava aldono al faka literaturo en komerco kaj instruado. Alfabeto ordigita laŭ anglaj terminoj. La artikoloj prezentas klarigon en la angla kaj en Esperanto de koncerna nocio. Kun traduko en la lingvoj germana, hispane, franca, itala, nederlanda, portugala kaj sveda/.

3. English-Esperanto Chemical Dictionary de D.R.Duncan. 1956.

4. S. Glasstone. La fundamentoj de elektrokemio kaj elektrodeponado (elektrotavolizo). Tradukis J.Mccarthy. Montevideo (Urugvajo). 1969. 124 p.

5. La fundamentoj de la varmtekniko. (Pri la varmo). Originale verkita en Esperanto de JUD Miroslav Tuma. Tlmače (Ĉeĥoslovakio). 1973. I, II, III-a volumoj.

*Numerojn 1-13 kompilis R.Sikorskij.

6. Technisches Wörterbuch. Deutsch-Esperanto. Ing. R.Hafenkorn. Ontario (Kanada). 1967.
7. A.Broise. Teknika terminaro pri ŝoseoj kaj pontoj. Rotterdam, 1959.
8. The Shoeman's Foreign Terms. 3-rd edition, 1962. 102 paĝoj. (8-lingva leksikono inkluzive Esperantan).
9. Kessler Kurt. Deutsche Redensart und Redewendungen in Esperanto. "Der Esperantist", №36-53. Berlin (DDR).
10. I.Manceau. Manlibro pri transporto kaj fluidaĵoj (likvaĵoj kaj gasoj). Dua eldono. Rotterdam, 1973. 251p. Ksilografita. (Verke por fieri).
11. Internacia elektroteknika vortaro. Esperanta-pola kaj pola-Esperanta terminaro. K.Siwicki. 56 paĝoj.
12. K.Siwicki. Maŝinoj kaj transformiloj. 42 paĝoj.
13. Haferkorn kaj Dellian. Scienca kaj teknika terminaro. Tokio, 1956.
14. E.Bekarev. Esperanta-ruse vortaro. Moskvo, "Sov. enciklopedia", 1974.
15. H.Saha. Esperanta fakvortaro. /Suplemento al la ilustritaj vortaroj germanaj: rusa (kun eldono neilustrita sed ankaŭ ĉi-tie tradukita), angla, ĉeĥa, franca, hispana, hungara, itala, pola, rumana - de la serio "Bildwörterbuch". VEB Verlag Enzyklopädie. Leipzig, 1959-1961. / Tallinn, 1963-1971. 502 paĝoj.
16. Prof. E.Grosjean-Maupin. kaj aliaj. Plena vortaro de Esperanto kun suplemento. Paris, 1971. SAT.
17. G.Waringhien. Plena ilustrita vortaro. Paris, 1970. SAT.
18. Reiersøl Olav. Plurlingva matematika terminaro. (Institut for matematiske fag, Universitetet, Blindern). Oslo (Norvegio), 1963.

Suplemento №4

Listo de literaturo
bezonata por terminologia laboro

1. E.Drezen. Internacionalizacia nauĉno-teĥniĉeskoj terminologioj. Moskva, 1936.
2. E.Drezen. Nauĉno-teĥniĉeskie terminy i oboznaĉenija i iĥ standartizacija. Moskva, 1936.
3. D. Lotte. Osnovy nauĉno-teĥniĉeskoj terminologii. Moskva, 1961.
4. Ivo Lapenna. La internacia lingvo. (Faktoj pri Esperanto). Londono, 1954. UEA.

TS-kunlaborantoj: A. Kogan
V. Gakalenko (Tifvin)

T e n d a r a j z o r g e j

Karaj geamikoj! Baldaŭ jam vi ricevos la Bultenon №1 pri SEJT-17. Kiel urĝan kaj gravan parton de tiu bulteno per la Organiza Komitato de SEJT-17 ni nun informas, ke la ĝenerala kotizo konsistas el:

- a) aliĝkotizo (poŝtaj elspezoj, insignoj ktp.)
 - por ĝelernantoj 4 rubloj
 - por gestudentoj 5 rubloj
 - por ceteraj 6 rubloj

b) partoprenkotizo (3-foja manĝado, lue de tendoj kaj dormosakoj, kulirejoj ktp.); kiu konsistas el 3 rubloj por ĉiu tago.

Oni rajtas (oni estas la personaro, menciata en la Bulteno №1) partopreni tiomtagan programon, kiom povas. Do, se vi povas veni nur por la Konferenco (5 tagoj) kaj 2 tagoj de la tendaro, vi de-

vas pagi 21 rublojn por 7 tagoj kaj (se vi estas studento, laboranto, lernanto) 5-, 6-, 4-rublan aliĝkotizon. La limdato por sendi la aliĝ- kaj partoprenkotizon estas la 10-a de junio 1975.

Rabatoj:

a) La sendintoj la plenan kotizon ĝis la 1-a de majo havu rabaton je 3 rubloj (la aliĝkotizo malgrandiĝu je 3 rubloj);

b) la sendintoj minimume 30 r. ĝis la 1-a de majo havu rabaton je 2 rubloj.

c) sendintoj nur aliĝkotizon ĝis la 1-a de majo havu rabaton je 1 rublo.

La sendintoj monon sed ne venintoj al la tendaro ricevos la monon krom la aliĝkotizo.

Kaptu rabaton, sendu kotizojn, karaj geaktivuloj!

La adreso:

492018 Ustj-Kamenogorsk-18, abon.k. 312, al
Anoĥin Boris Vasiljeviĉ.

Organiza Komitato de SEJT-17

K l u b a v i v o

Suja, Ivanova regiono.
(El privata letero).

En la gazeto "Seveta Dagestano" N°6, 1974 aperis artikolo de J. Sulejmanov "Tra la tuta vivo", dediĉita al Prof. E.A. Bokarev, lia vivo kaj agado. Estas menciata lia longjara laboro por Esperanto. Generale, la karaktero de la artikolo estas lingvosciencia, kaj, laŭ mia opinio, ĝi ne malhelpas dum preparado al prelegoj por neE-istoj pri la lingvo internacia kaj Prof. Bokarev. Eblas ĝin traduki en Esperanton kaj publikigi en iu-ajn E-periodaĵo aŭ eĉ en "Amikeco" aŭ "Aktuale" mem.

Mi en Suja gvidas du rondetojn por gelernantoj kaj unu por plenkreskuloj. Januare en la centra urba kinejo okazos ekspozicie infandeseĝnaĵoj. Mi organizis ĝis la Novjaro 8 prelegojn en la urbo. La laboro, bedaŭrinde, rabas la tutan tempon, mi ja en la internulejo laboras kiel viedirektoro pri eksterlanda laboro, instruas la germanan lingvon. La E-laboro estas unu el la branĉoj de la Klubo de internacia amikeco. Bedaŭrinde, granda parto de geknaboj estas orfoj, ili preskaŭ nenion povas abonati (mi mem abonis por ili dekon da "Juna amiko"), des pli vojaĝadi.

En "Nedelja" N°50 en unu el la artikoloj oni ne tre bele eldiris pri Esperanto. Mi skribis leteron al tiu-ĉi ĵurnalisto kaj iomete "insultis" lin. Eble iu ankoraŭ skribis?

Saluton!

S. Smetanina

KRASNOJARSK

La 14-an de decembro en ŝtata universitato de Krasnojarsk ekestis Klubo de internacia amikeco, kiu konsistas el 3 sekcioj: sekcio de la angla lingvo, germanlingva kaj E-sekcioj. La E-sekcio organizis E-kurson, kiun konstante vizitadas 15-25 personoj. La Klubo havas bonajn rilatojn kun la komsomola organizaĵo de la universitato kaj la katedro pri fremdaj lingvoj. Jam nun inter la E-kursanoj elstaras kelkaj personoj, kiuj montris sin tre aktivaj; unu el ili estas juna universitata instruistino E. Sudareva. En la universitata organo "Universitetskaja ĵiznj" aperis 4 artikoloj pri E kaj la Klubo, unu artikolo de B. Kolker en la regiona komsomola organo.

Ni kontaktas kun P.D. Agapov, kiu estas veterano de E-movado kaj aktive helpas al ni: li organizis 4 prelegojn pri literaturo kaj la historio de Esperanto.

En majo post finiĝo de la E-kurso ni planas organizi universi-
tatan kaj finjare urban E-klubojn.

Nia adreso:

660075 KRASNOJARSK-75, abon. k. 2420, KID (E-sekeio).

V. Sapojnikov

TUTMONDA TAGO DE VIROJ (TTV) - LA 1-an DE APRILO

Virinoj havas siajn tagojn:

1. La Internacia Virintago (la 8-a de Marto);

2. La Patrino-tago (la 2-a dimanĉo de majo).

Krome la virinoj (post jarcentoj) nomis ĉi-jaron kiel sia!

Viroj, kompreneble, aprobas la delikatan ambicion de virinoj, ĉar ĉiuj entuziasmaj virinoj ja iam iĝos "agrablaj" bopatrinoj. Pro tio ne decas ekkvereli kun ili!

La konata modesteco de viroj aplaudas ĉiam kaj ĉie al niaj karaj inoj. Dank' al seriozaj virinoj ni povas ĝui nur la egalecon labori kiel elefanto... Jes, ni povas tiel pacience labori, se al ni etendas la manon efika vivhelpanto - bona ŝerco. Ĝis nun la plej saniga por la viroj estas bona ŝerco. La virinoj konsideras ofte la virojn kiel ŝercemulojn + aĉulejn, kiel neseriozajn estaĵojn. Precipe la propran edzon (preskaŭ azenon).

Tial ni turnas nin al niaj karaj karulinoj, por ke ili permesu al ni festi la konatan ŝercotagon - la 1-an de aprilo kiel TUTMONDAN TAGON de VIROJ.

Dum tiu-ĉi tago viroj elĉerpas kaj enĉerpas amason da bona humoro por poste esti al niaj amataj inoj pli laboremaj kaj ... Se Vi tion ne kredas, tio signifas, ke Vi ne estas ŝercemulo!

Laŭ kutimo viroj ĉiam invitas virinojn al sia festeno. Entute viroj estas tre brava sekso: ĝentilaj, bonhumoraj, bonkoraj kaj tre sparemaj. La plej granda elspezo (dum horo, tago aŭ jaro) estas 3,62 rubloj (la prezo de botelo da brando), se nur virinoj tion instigas fari.

Kiel konate, viroj en la tuta mondo pli kaj pli "ĉ e s a s" drinkadi. Tial por la Virotago estas proponata, ekzemple, saniga lakto (ne tre grasa). Anstataŭ alkoholaĵoj estu pli da humoraĵoj ĉu per rakontoj, ĉu kantoj, aktoraĵoj, telegramoj, ekspozicioj, premioj ktp. Korespondaĵoj okaze de tiu tago enhavu nur bonhumoraĵojn!

Karaj viretoj, se viaj amataj virinoj ne permesas al vi organizi la tagon festan, tiam, kompreneble, obeu al la ordo, ĉar oni diras, ke la plej grava estas ja la hejma-paco (kiam unu devas ĉiam aprobe silenti!).

Viretoj, je via dispoŝo estas ankoraŭ unu efika ebleco. Faru al viaj karulinoj longan, longegan mankareson kaj laŭdu ilin ĝis la angela grado, kaj tiam vi povas esti certaj, ke eĉ la tutan organizan zergon surprenas al si viaj multnombraj karulinoj.

Interalie, jam troviĝas la pioniroj en Estonio. La Viljandia E-klubo festas TTV jam ekde la 1972-a jaro, kaj sukcese. Se eblas, tiam partoprenu ĝin, se ne, tiam bonvolu surprizi la organizantojn per pk. aŭ per io alia.

TTV estas festo por ĉiuj kunvenantoj: ĉiu partoprenanto estu aktiva kaj entuziasme movu sian cerbon. La ĉefkonsilo al TTV estas: parolu malrapide, klare kaj bonhumore. Paroligu aliajn virojn, (sed ĉefe la virinojn) forte, kuraĝe, kaj, kompreneble, elegante! Ne enu mem nek lasu aliajn enui!

Trafoliuminte la kalendaron, Vi trovos nur kelkajn Tutmondajn Tagojn, sed la plej grava kaj la plej vasta el ili estos TTV! La fondinto de TTV s-ano Hans Anso esperas, ke dum venontaj jarcentoj ĝi disvastiĝos en la tuta mondo, eĉ en ĝangaloj.

Se Vi aliĝos iam al TTV, tiam bonvolu informi la pionirojn, kiuj estus pro tio tre dankemaj al Vi.

202900 Estona SSR, VILJANDI,
p. k. 33, E-klubo

RENKONTIĜO EN ŠIAULIAI

Post kelkjara interrompo la 7-9 de februaro E-istoj de Šiauliai (Litovio) organizis renkontiĝon. Ĝi okazis 20 km de Šiauliai apud la ripozloko Pageluvis. La renkontiĝon partoprenis gastoj el Vilnius ("Juneco"), Kaunas, Klaipeda, Liepaja (Latvio), Kapsukas. La plej granda parto de la partoprenintoj estis kursfinintoj, de la programe konsistis el demonstrado de kinofilmoj kaj lumbildoj pri "Boata marŝo" kaj pri la renkontiĝo "Giruliai-74", lernado de novaj kaj malnovaj kantoj, ludoj, konkursoj...

Šiauliaianoj promesis denove organizi renkontiĝon en komenco de la somero, sed jam en pli granda skalo. La kondiĉoj por tio estas bonaj, la ĉirkaŭaĵoj - belegaj.

S. Gaidemavičius ("Juneco", Vilnius)

I n f o r m o j * A n o n c o j * P e t o j * S c i i g o j

En la E-Komisiono de SSOD enposteniĝis nova sekretario - Berjoza Anatelij Vasiljeviĉ. Petu ĉe li E-literaturen, korespondadresejn, interesiĝu pri ebleco partopreni eksterlandajn E-arangejn ktp. La adreso: 103009 MOSKVO K-9, pr. Kalinina, 14.

V. Azoloviĉ (Moskvo)

* * * * * * * * *

LINGVOŜATANTOJ? ATENTU!

Bonvolu sendi viajn demandojn pri gramatikaj, leksikaj, fonetikaj kaj aliaj eroj de Esperanto al: 450025 UFA-25, abon. k. 162, B. G. Kolker. La respondoj aperos en lingvaj rubrikej de "Aktuale" kaj "Amikeco", estos utiligataj por la daŭriga parto de la lernolibro.

B. Kolker (Ufa)

* * * * * * * * *

TASĜENTO

Ni proponas al SEJM-anoj aĉeti ĉe ni opajn numerojn de "Heroldo de Esperanto" por la jaroj 1953, 1956-1972. Unu numero kostas 10 kop.. La monon sendu al la SEJM-kasisto, al ni nur la poŝtan kvitancon kaj poŝtmarkojn por afranko de banderolo. Tiamaniere vi pliriĝigos la kason kaj liberigos al ni spacon.

E. Perevertajlo

* * * * * * * * *

ZAPOROĜJE

Niaj klubanoj daŭrigas ordigi la bibliotekon donacitan al la klubo de s-ano A.I.Palkov. Inter la donacitaj periodaĵoj troviĝas pluraj duplikatoj, kiuj estas interŝanĝeblaj kontraŭ aliaj periodaĵoj el aliaj kluboj. Listo de interŝanĝeblaj duplikatoj estas publikigita en "Novaĵoj el Zaporoviĉe".

La koresponda kurso ĉe ZKE plene transiris al la lernolibro de B.Kolker. Ni memorigas, ke akcepto de novaj lernantoj daŭras ĉiam sen limigoj; bv. direkti volontulojn al: D.Ju.Kolker, ab. jaŝĉ. 649, 330000 ZAPOROĜJE-centr. Petu per poŝtkartoj detalajn klarigojn.

* * * * *

ĤMELNICKIJ

La Ĥmelnicka E-klubo komencis serĉadon de materialoj pri la temo: "Kiel N.I.Kuznecov, militagento de jarcento, farigis esperantisto". Ni esperas je preteco de ĉiuj helpi al ni en ĉi demando interesa kaj grava por miloj da samideanoj en USSR.

SKRIBU

Irlandaj mezlernejanaj respondos al ĉiuj bk kaj leteroj ricevotaj januare ĝis junio 1975. Esp-Rondo, St. Columba's College, DUBLINO-14.

El "Ukrainia informilo" №5, februaro 1975

* * * * *

Ĉi-jare la Estona ŝtata eldonejo "Esti Raamat" aperigos en Esperanto la libron "KALEVIPALY" - estona popola eposo, prezo 90 kop. (Templano 1975, pĝ. 64, №187.) kaj bone ilustritan prospekton "TALLINN", 1 rb. 48 k. (Templano 1973, pĝ. 92, №304). Vv. ĉion mendi PERE DE LOKAJ AGENTEJOJ Oblknigotorg. La adreso por mendoj: Eesti-knigotorg, Pjarnuskoje ŝoseo, 10, 200000 TALLIN, Estona SSR.

Ekzemplon de mendo vidu sube.

El "Ukrainiaj informilo" №5, 1975

* * * * *

ИНТЕРКЛУБ

/секция эсперанто/

Донецкий ГК ЛКСМУ, 3400500 Донецк, ул. Артёма, 98.

тел. 3-48-10

17 февраля 1975 г.

ДИРЕКТОРУ ДОНЕЦКОГО ОБЛКНИГОТОРГА

В этом году в эстонском издательстве "Эсти Раамат" выходят на языке эсперанто книга "KALEVIPALY" /Темплан 1975г., стр. 64, №187./ и проспект "TALLINN" /Темплан 1973г., стр. 92, №304/.

Для членов интерклуба и жителей Донецка, изучающих язык Эсперанто, просим заказать указанные издания для реализации через книжный магазин "Дружба" в следующем количестве:

- 1/ "KALEVIPALY" /90 коп./.....300 экз.,
- 2/ "TALLINN" /1 р. 48 коп./.....100 экз.

Адрес книготорга: Эстикниготорг, 200000 Таллин, Пярнуское шоссе, 10.

Руководитель секции эсперанто

Н. Стародубцев.

NI ĈESIGU LA DISKUTON PRI NEOLOGISMOJ

La ekflaminta diskuto post la apero de la artikolo "Baseta mal-eldulo..." (vd. "A"-10(14) elvokis amasan reeĉion de legantoj de "A". La Redakcio severe kontrolante la gramatikan flankon de la artikoloj dediĉis nesufiĉan atenton al la stila flanko de tiuj. Rezulte la diskuto atingis tro akran karakteron transirantan al personaj ofendoj. Ni sincere petas pardonon de k-do G.Gercikov kaj ceteraj personoj rekte aŭ nerekte ofenditaj, ankaŭ de la legantoj, kiuj sentas nekontenton pro la nesciencaj diskutrimedoj.

Ambaŭ flankoj, estante ardaĵ adeptoj de Esperanto, staras en kontraŭaj pozicioj koncerne la riĉecon de la lingvo. Ni esperas, ke finfine la diskutantaj flankoj trovos komunan opinion kaj konkorde laboros por nia glora ideo. Sed nun por malvatmigi la pasiojn ni estas devantaj ĉesigi, almenaŭ provizore, la diskuton pri neologismoj sur paĝoj de nia informilo. Por eviti miskomprenon ni petas la kontribuantojn ĉiuflanke kontroli ĉiujn asertojn. La Redakcio siaflanke promesas en estonto pli atente rilati al la venantaj kontribuadoj, por ke ne plu havu eston tia "diskuto".

La REDAKCIO

ATENTIGO

Ĉiu vica numero de "Aktuale" estas fermata la 10-an de Ĉiu monato. Escepto estos la julia numero de "A", kies fermo lige kun la tendaro estos la 30-an de junio. Se Vi volas, ke Via kontribuaĵo, aperu justatempa kaj estu ankoraŭ aktuala post la apero, de direktu ĝin al la Redakcio al la supreindukita dato.

La Redakcio

ĜOJPLENAJN

MAJAJN

RENKONTIĜOJN!

Redaktis V.Ebel

Redakcio:
656099 BARNAUL-99,
abon. k. 11,
"Aktuale"